Vekiĝu, dormanto

VÅKN OPP, DU SOM SOVER



2. En valoj surteraj
blindigas nebulo,
kaj ploras la kor'.
Aŭdiĝas ĝemado,
kaj en la okulo
vidiĝas la plor'.
Sed aŭdu, ho koro,
pri nia Sinjoro,
pri savo kaj grac'!
Jesuo alvenos kun pac'!

3. En valoj surteraj
la dornoj pikemaj
malhelpas al ni.
Sopiras jam multaj
kun preĝoj kaj ĝemoj
al paco ĉe Di'.
Nun ĉesu la ploro
kaj ĝoju la koro,
vekiĝu, anim',
kaj kantu, ho koro, sen tim'!

4. Okuloj leviĝu,
ĉielen rigardu,
al luma helblu' !
Nun ĝoju kaj kantu,
la koro nun ardu,
alvenis Jesu'.
Se pekoj vin premas
– pro l' graco vi emas
al nia Sinjor'
laŭdkanti kaj danki en kor'.

5. Jes, laŭdon al Dio
pro tago kaj brilo
kaj lumo ĉe ni.
La vojon, la veron,
la vivon la Filo
alportis de Di'.
Al homo la laca
promesu, ke graca
Vi per Via vort'
nin gvidos tra vivo kaj mort'.

VÅKN OPP, DU SOM SOVER • NSB 15 • Salmebok 12 • M: Ludvig Mathias Lindeman 1871 • norvega T: Magnus Brostrup Landstad 1861 • E: Hans Amund Rosbach, 1966 en CH 8, Kloster Kirchberg 2014